

Ludwig Uhland,

## La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Supre staras sur la monto  
La silenta kapeleto,  
En la valo, ĉe la fonto  
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado  
Nun eksonas tra l' silento, -  
Haltas knabo en kantado  
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,  
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en [www.literaturo.dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.*